

LA NORDAMERIKA

Esperanto- Revuo



Vokas Pitsburgo!

4-5-6-7 Julio



Venu do amase

Parolante kun la mondo

JUNIO • 1963

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

vol. 11, no. 4

51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio

DONALD BROADRIBB, Redaktoro

La Nordamerikan-Esperanto-Revuon (fonditan en 1953) eldonas la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, landasocio de la Universala Esperanto-Asocio kaj partoprenanto en la programo "Popoloj-al-Popoloj."

Kotizoj: abono kostas \$3.00, donacabono kostas \$2.75 (tri por \$5.00). Membreco simpla kostas \$5.00, kaj inkluzivas abonon. Aliaj kategorioj de membreco estas: subtenanta, \$10.00; patrona, \$20.00; viva, \$100.00; kombinita membreco por geedzoj, \$7.00.

Adreso: ĉien por la Ligo, informpetojn, kotizojn, kc., sendu al la Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Komunikojn por la Revuo, sendu al la redaktoro ĉe la adreso de la Revuo.


Oficistoj de E.L.N.A.: Prezidanto, David Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington. Vicprezidanto, Charles Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California. Sekretario, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Kasisto, John Futran, 601 West 164th St., New York 32, New York. Membroj de la Estraro: Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas. Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas. Frans J. Jagher, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania. James Lieberman, 24 Claflin Rd., Brookline 46, Massachusetts. Paul Nace, 1410 Ray Rd., Hyattsville, Maryland. Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California. Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico. Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Fakoj de la Ligo: Inform-Sekcio, ĉe Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Aŭd-vida Sekcio, ĉe H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Libro-Servo, Esperanto League Book Service, Esperanto League. Administracio de la Revuo, ĉe Francis Helmuth, 5615 Beaumont Avenue, La Jolla (San Diego), California.

Anoncoj: korespondanoncojn la Revuo presas senpage. Tarifo por aliaj anoncoj, kaj por reklamoj: \$10 por plena paĝo, \$6 por $\frac{1}{2}$ paĝo, \$4 por $\frac{1}{4}$ paĝo, \$2.50 por $\frac{1}{8}$ paĝo; aŭ 15 cendoj por unukolona linio. Sur la ekstero de la malantaŭa kovrilo, anonco kostas 50% pli.

Artikolojn kaj Librojn Recenzotajn sendu al la redaktoro, Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio. Kalkulu 4 tagojn por aera postsendo, 6 semajnojn por mara poŝto. Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la redakcion antaŭ la 1a de la antaŭa monato.

Nia Kovrilo: H. K. Ver Ploeg, direktoro de la aŭd-vida fako de ELNA.



NOVAJ LIBROJ

La Unua Vojaĝo, de Mi Hu. Eld. Anshe Haarec, Adama, 1973. 348 p., broŝ. 15 ilustraĵoj tutpaĝaj, kaj desegnaĵoj en la teksto. Prezo: kvin steloj.

Estas malfacile recenzi libron de tiel konata esperantisto kaj mondheroo. Supozeble la redakcio petis min prepari la recenzon, ĉar mi partoprenis la ekspedicion, kaj tial pli bone ol la plej multaj povas taksi la valoron de la verko. Sed estas ĝenerale sciata, ke inter la aŭtoro kaj mi ekzistas kelka manko de reciproka simpatio, do eble mia objektiveco pridubeblas.

Tamen, negrave ĉu aŭ ne mi estas la plej kompetenta recenzisto por la libro, mi sentas bezonon averti la legantojn pri ĉi tio: **La Unua Vojaĝo** estas danĝera libro, kaj gravas ke oni estu avertata pri ĝi.

Unue — kvankam ne plej grave — estas, ke ĉie en la 348 paĝoj Hu klopodas prezenti la ekspedicion kvazaŭ grandiozan sukceson. Tia ĝi ne estis. Ĝi estis la plej granda fiasko kiun nia civilizacio renkontis ĝis nun, kaj sekvi lian konsilon (sur paĝo 346) povus okazigi tragedion laŭ skalo neniam antaŭ vidita.

Ĉu nia homaro nenion lernis, post la kolonizado de la Amerikoj? Ĉu nia homama sento neniom pligrandiĝis, post la buĉado de indiĝenoj en la Suda Maro? Ĉu estas koncepteble, ke en ĉi tiu moderna kaj "kristana" mondo, iu serioze sugestus ke 15,000,000 personoj estu sendataj al tiu trunkvila, paca, kaj (laŭ nia vidpunkto) subevoluinta loko por sklavigi la loĝantojn kaj detrui la kulturon tie? Ĉu estas koncepteble, ke la U.N. ne nur serioze konsiderus la proponon, sed eĉ nomis komisionon por prepari la praktikajn detalojn de ĝia efektiveco? Kiel voĉo krianta en la dezerto, mi avertas, mi alvokas, mi petegas: pensu, kion vi faras???

Jes, Mi Hu prezentas la aferon laŭ aliaj terminoj. Li ne parolas pri sklavigo, sed pri "amasoj da laboremuloj, kiujn eĉ pagi oni ne devas." Li ne parolas pri detruo de kulturo, sed diras ke "estas eĉ nia kristana devo, levi tiujn ulojn el ilia marĉeca ekzisto; instrui ilin laŭ la normoj ĉie akceptitaj. Kaj se, komence, estos necese kvazaŭ trudi nin al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas nian celon, ili tamen nin dankos poste." Vidante tiajn frazojn en libro el 1498, ni ridetus. Kial ni ne povas egale klare vidi la nuntempon?

Mi diras ke la libro de Mi Hu estas danĝera. Ĝi estas danĝera, ne ĉar ĝi mensogas pri faktoj: ĉi tio estas direnda, la libro ĉie skrupule prezentas faktojn; sed ĉar ĝi per sia interpreto de la faktoj tiel trompe prezentas la situacion. Oni diras, ke la Readers Digest planas prezenti la libron en kondensita formo, en sia julia numero. Tial estas grave, ke jam nun oni sciu pritaksi ĝin.

Bone, do: ni kvar (Mi Hu, mi mem, Robert Rosenmill, kaj Jean Affaires) partoprenis la ekspedicion al Marso. El la kvar, Robert mortis. **La Unua Vojaĝo**, sur p. 178, objektive raportas lian morton. Bando da indiĝenoj atakis nin, kaj mortbatis Robertson dum li brave klopodis defendi nian ŝarĝaŭton. Kion tamen ne diras la aŭtoro, kaj tion oni devas scii, estas ke la indiĝenojn kuragiĝis kaj helpis Jean Affaires: jes, tiu sama Jean Affaires kiu estas lasita sur Marso kiel administranto de la tera kolonio, kaj al kiu lastatempe donis la Nobelkomitato sian pacpremion! Tiom la mondo scias pri la vera historio de la ekspedicio.

Robert mortis, ĉar li aŭdacis kontraŭstari la planojn de Hu kaj Affaires. Jam de la unua momento, kiam ni eliris la raketon kaj metis

niajn piedojn sur la firman, fekundan grundon de Marso; jam de la momento, kiam Robert trovis ke la atmosfero enhavas sufiĉan oksigenon por facila spirado; jam de la momento, kiam Affaires rimarkis la vastajn kampojn da greno kaj la metalriĉajn grundojn; jam de tiuj momentoj, nin obsedis nur unu penso — kia neimageble perfekta loko por tera kolonio, al kiu ni povus transsendi la malsatajn milionojn, pri kiu povus amike kunlabori la malamikemaj nacioj de la tero.

Jes, nin ĉiujn tiu penso obsedis. Mi Hu prave, kaj bele, priskribas tiun unuan tagon, en sia dua ĉapitro. (La unua ĉapitro estas nur enkonduko.) Kaj ne malplej Robert entuziasmis. Sed post nelonge, indiĝeno aperis. Tio devus averti nin pri nova komplikigo, sed mi konfesas ke el ni, nur Robert konceptis la moralan problemon. Li estis amatora lingvisto, kaj tuj volis studi la indiĝenan lingvon. Ke li, kaj ni, malsukcesis, estas sendube nur pro la diferenco inter la tera kaj marsa kulturo, kaj certe ne pro manko de klopodado nia.

Mi menciis, ke la specimenoj de marsa lingvo donitaj en **La Unua Vojaĝo** (apendico a) ne estas senescepte ĝustaj. Mi supozas ke temas pri preseraroj. Mi zorge reaŭskultis la magnetofonbendojn, kaj sur paĝo 347, supre, la unua linio nepre tekstas "ubanorekdrobroselemosimufafalenu." Mi ne enmetas la super- kaj sub-signojn uzitajn de Hu, pro la presproblemo. Hu diras, ke ni tute ne scias ĝian signifon. Tio estas nur parté vera: la marsano, dirante tion, estis ekzamenanta nian ĉielatlason, kaj mi estas certa, ke li volis iel komenti pri ĝi.

Evidentiĝis, ke la indiĝenoj loĝas sur la tuta globo. Denove, Hu pravas, raportante ke ĉe ili koncepto pri grupo aŭ pri komuna posedo ne ekzistas. Ĉe ili, nur privata posedo ekzistas, kaj sekve nenio simila al tersenca "tribo" aŭ "komunumo" aŭ "nacio" aŭ eĉ "gento" ekzistas. Hu utiligas tiun fakton, por pravigi sian deziron establi teran regadon tie. "Car ne ekzistas grupoj aŭ triboj, ni

neniel konfliktus kontraŭ jam establitaj moroj. Car nur individua posedado okazas, preni kiel komunan posedadon por la tero la tutan planedon, kaj la diversajn partojn doni al teraj grupoj neniel ŝanĝus por la marsanoj la vivkutimojn." Sed kion li ne mencias, estas ke neniu komunumo ekzistas sole el individuoj private posedantaj. Komunumo signifas ke individuoj fordonas iujn rajtojn al la grupo, kaj tio nepre ŝanĝus la kulturon.

Vidu kiel logike Hu prezentas sian argumenton: la marsanoj ne havas reĝon, do establi administranton ne ĝenus ilin. Li eĉ ekaplikis tion, lasante Jean Affaires tie. La luksa vivo, kiun sendube neniu havas Jean Affaires sur Marso, estas facile imag-ebla. Li povas altrudi impostojn, kaj ilin uzi por si mem . . . ĉar ĉio estas nova por ili.

Tion, do, proponas Hu: sendi, amase, 15,000,000 teranojn al Marso. Tie ili loĝos, ĉiu havos laŭvole grandan nombron da sklavoj ("nepagendajn laboristojn" laŭ Hu). Ĉu aŭ ne la indiĝenoj konscios, ke ili estas sklavoj, — tio ne estas la ĉefa afero. Probable ili ne konscios, unue. Ili ja ne konas monon, aŭ pagon, dunganton, aŭ servadon al komunumo. Sed ni konscias.

Car postuli ke 15,000,000 altevoluintaj teranoj lernu la "sendube primitivan kaj konceptomankan" lingvon de la marsanoj estus "absurde; neniu mense sana persono sugestus tion" ni devigus ke la marsanoj senescepte lernu nian lingvon. Ilia vasta literaturo (kiu ja ekzistas, malgraŭ la asertoj de Mi Hu) estus poreterne perdita, kiel la indiĝenamerikaj. Car ilia sistemo de paca kunvivado, plena respekto al la rajtoj de alia persono, kaj profundkarakterata evoluado (dum la tri semajnoj sur Marso, mi neniam vidis eĉ unu plorantan infanon!) ne konformas al niaj ideoj pri "la komunumo servas ĉiujn, kaj ĉiu servas la komunumon" ni devas do "civilizigi la indiĝenojn, sed ne tro abrupte. Unue, dum kelkaj jardekoj, ili kutimiĝu al nia kulturo. Eble post du aŭ tri generacioj, ilia natura progres-

manko estos sufiĉe malaperinta, por ke ni povu transdoni al ili malgrandan kvanton da aŭtonomeco. Sed ne estas eble, nun, antaŭvidi la tempon, kiam ne neceso ke terano estu la ĉefa administranto.”

Mi Hu deklaras (p. 134) ke ekzistas granda, fervora grupo da indiĝenoj, kiuj entuziasme akceptis nin, kaj laŭeble helpis nin. Jes, tio estas ankaŭ vera. Sed lia raportado kvazaŭ enombrias la fakton, ke tiuj 6 au 7 personoj estis nur tre malgranda parto de la tuto. Ĉiam kaj ĉie oni povas trovi kelkajn korupteblajn homojn.

Mi ne povas fini la recenzon, sen mencio kaj akra protesto kontraŭ ĉapitro 4, en kiu Mi Hu pritraktas min. Estas evidente, ĉar kvankam mi estis unu el la originalaj kvar en la ekspedicio mian nomon ĝis ĉapitro 4 li mencias nur trifoje, ke Hu sentas honton kaj lian konsciencon ĝenas liaj glorcelaj planoj. Li sekve devis fabriki mensogojn, por ĉapitro 4, kiuj ĝiskore ofendus min, se ili ne estus senvalorigataj de la teruro kiun prezentas lia tuta libro.

Nome, en ĉapitro 4, Hu diras ke mi kontraŭas lin kaj liajn planojn, ne pro veraj sentoj pri humaneco kaj moralo, sed pro propra monavido. Li diras ke mi akiris “plurmil kvadratajn kilometrojn da metalriĉa tereno.” kaj timas, ke se la U.N. proprigus por la tero la tutan planedon, mi sekve perdus la eblon fariĝi riĉa ekspluatante la terenon. Kiel en ĉiu versimila mensogo, troviĝas grajneto da vero en lia diro. Estas vere ke mi posedas malgrandan terenspacon sur la planedo. Ĉu metalriĉa, mi ne scias: mi ne estas geologo. La precizajn dimensiojn mi ne scias: ĝin donacis al mi indiĝena amiko, ĉar mi kuracis lian malsanan filon. Sendube estas vere, ke se la U.N. proprigus por la tero la tutan planedon, mi perdus tiun terenon. Sed supozigi, ke tio motivigas miajn protestojn, kaj ne pura humanismo, estas korvunda falsajo.

Dirinte ĉion ĉi, mi devus mencii ankaŭ la bonajn aspektojn de la libro. Ĝi estas la unua publikaĵo en kiu aperas la belaj kolorfotaj faritaj de Hu, kaj la informplenaj desegnaĵoj

de Affaires. Kiu vere volas vidi, kiel aspektas la marsa surfaco, kia homo estas indiĝeno, kc., nepre rigardu tiujn bildojn. Ili valoras la (tre malaltan) prezon de la libro. Ĉapitro 3, en kiu Hu pritraktas la monolitajn monumentojn, kaj la bestaron de la planedo—inter alie la ege amindan katimilan beston kiun ni nomis laŭ la indiĝena nomo Krrrrro, evidente onomatopea nomo—estas valora kontribuo al nia scienca scio.

Sed, malgraŭ tiuj bonaj kvalitoj, la libro estas—kiel dirite—dangera. Pli bone estus, atendi la publiigon de mia volumo “Marso: Nova Espero aŭ Nova Tragedio?” en junio, en kiu la originalaj fotoj faritaj de Robert Rosenmill aperos.

Noto de la redaktoro: la redakcio ankoraŭ ne vidis ĉi tiun libron, kaj do ne povas juĝi la pravecon de la supra tre negativa recenzo. Sed ĉar ni lasas al niaj recenzistoj plenan liberecon de opiniesprimo, ni ĝin presas. Se Sinjoro Hu deziras respondi al la recenzo, ni volonte disponigos al li spacon en nia venonta numero.

Ni utiligas ĉi tiun noton por denove insiste peti, ke eldonistoj sendu al ni duope siajn librojn por recenzo.

—DONALD BROADRIBB.

★ ★ ★

NOVA FINANCA KOMITATO

La estraro de la Ligo decidis establitan financon komitaton, por kontroladi la financon staton kaj funkciadon de la Ligo. Nomitaj al la komitato estas Forrest D. Turner (estro), Julie Regal, Adrian Hughes, kaj Robert Runser. Ĉi tiu komitato laboros kun nia diligenta kasisto John Futran. Cetere, ni uzu ĉi tiun okazon por gratuli S-ron Futran pro lia tre kompetenta plenumado de la kasistaj taskoj (kiuj inkluzivas zorgadon pri la membrolisto kaj kotizpagado). Ni ankaŭ menciu speciale la servon kiun faradas S-ino Dorothy Holland, sendante ĉiumonate avizojn al membroj, kies kotizo baldaŭ repagendos.

David Richardson:

La Rubando, Kiu Parolas

Per la magnetofono eĉ izoluloj aŭdas regule nian lingvon, parolatan en la kvar anguloj de la mondo. Jen ELNA-ano, kiu ebligos tion ankaŭ al vi.

Se vi estas tipa esperantisto, la aŭdado de nia lingvo estas sorĉa afero — precipe, se temas pri eksterlandaj parolantoj. Ĝis la lastaj jaroj, ni en Norda Ameriko ĝenerale havis tiun ĉi sperton nur malofte: vojaĝado al foraj landoj estas multekosta, kaj pro la distanco, plejparte neebblas aŭdi la radioprogramojn esperantajn.

Sed la magio de mallargaj bendoj, kapablaj kapti kaj konservi por ĉiam la sonojn sur ili registritajn, ŝanĝas ĉion ĉi. Hodiaŭ ne ekzistas kialo por esperantistoj, ke ili ne aŭdu regule kaj ofte nian lingvon, kiel ĝin parolas la plej bonaj kaj plej diversaj parolantoj.

Nia membro H. K. ver Ploeg (proncu: ver-PLU), estro de la Aŭda-Vida Fako de ELNA, jam de pluraj monatoj administras novan kaj tre utilan agadon. Oni nomas ĝin "klubo," sed fakte ĝi estas unu el la regulaj servoj de la Ligo, kiun povas partopreni kiu ajn esperantisto en Norda Ameriko.

Jen kiel funkcias ĉi tiu tre uzinda servo. Ĉiu enskribinto, ĉu loka esperanta societo aŭ individua samideano, ricevas ĉiumonate sonbendon, kiu estas konservebla dum tuta monado por uzado. La bendoj daŭras dum unu ĝis du horoj, kaj estas elektblaj el kreskanta kolekto ĉe la hejmo de S-ano Ver Ploeg en Spokane, Washington. Post la unumonata daŭro, oni resendas la bendon, kaj samtempe elektas novan.

La kosto de partopreno en ĉi tiu praktika servo estas vere modesta. Ĉiu "membro" pagas unue dek dolarojn, el kiuj kvin dolaroj estas depono, garantio kontraŭ perdo aŭ difekto de la pruntotaj bendoj. La depono estas resendota, post finiĝo de la membroperiodo, se la membro elektos ne renovigi sian membrecon. La ceteraj kvin dolaroj pagas por la servo dum

unu jaro, do post la unua jaro la jara kotizo estos nur kvin dolaroj. La kotizo estas sufiĉe alta por pagi la efektivajn kostojn de la bendoj kaj poŝtendo, sen konsidero pri la grandaj elspezoj de tempo kaj la funkciigo de la ekiparo, kiu apartenas al S-ano Ver Ploeg.

Membroj de la servo ĝis nun trovigas tra Usono kaj en Kanado. Niaj legantoj en Meksiko estas same invitatataj partopreni, laŭ la samaj reguloj.



Efektive, la tasko registri kaj kopii tiom da individuaj bendoj ĉiumonate okupas multege da horoj, sed S-ano Ver Ploeg ne bedaŭras la tempon, pro siaj grandaj amo kaj fido al Esperanto, kaj al la eblecoj de la "magiaj rubandoj" por proksimigi la popolojn.

La Aŭda-Vida Fako de Ver Ploeg ne koncerniĝas sole pri bendoj, sed ankaŭ pri filmoj, diapozitivaj, ktp. La akirado de tiuj ĉi ankoraŭ daŭras; pli poste oni anoncos liston de la haveblaj materialoj, en la Revuo. La

intenco estas, ke la Fako fariĝu depono por ĉiaspecaj aŭdeblaj kaj videblaj helpiloj por la informado kaj instruado de Esperanto.

Se vi ankoraŭ ne utiligis la magnetofonan servon de la Aŭda-Vida Fako, turnu vin jam nun al ĝia adreso: 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Vi ricevos plenajn detalojn kaj eĉ malgrandan specimenan bendon.

Ni ne perdu la okazon ankaŭ menci alian, tre ekscitan aspekton de la magnetofonaj bendoj por Esperantistoj. Tio estas la uzado de bendoj por korespondado. Necesas ankaŭ diri ke la nelacigebla sekretario de ELNA, Conrad Fisher, pioniris en tiu kampo de internacia, peresperanta voĉa korespondado, kiun oni ofte nomas "voĉpondado". Certe multaj individuaj esperantistoj en Norda Ameriko jam uzadas siajn magnetofonojn por korespondado. Fisher kaj Ver Ploeg estas ankaŭ membroj de la granda monda organizaĵo "World Tape Pals" (Mondaj Bend-Amikoj), kaj esperas labori ankaŭ en la kadro de tiu grupo por antaŭenigi Esperanton.

"Parolantaj leteroj" oni nomas la bendojn, kiujn oni registras babile por sendi, anstataŭ la kutimajn skribitajn, al siaj korespondantoj. Uzante la plej malgrandan rapidecon kaj ambaŭ trakojn de dutraka bendo, oni povas registri multe pli da teksto ol en kutima letero, sur bendo en bobeno nur tri kolorojn (7½ cm) larĝa. Oni povas aĉeti la bendon jam en skatoleto, kiu servas kiel poŝta paketo.

Magnetofonaj aparatoj estas hodiaŭ tre facile aĉeteblaj. Ili venas en multaj specoj kaj postas kosti de kelkaj dekoj da dolaroj ĝis centoj da dolaroj. Ili haveblas en unutraka (profesia, por radiostacioj kc.), dutraka (la plej kutima), kaj nun kvartraka (stereo) formoj. La plej kutimaj maŝinoj irigas la bendojn laŭ rapideco de 3½ koloroj (9½ cm) en ĉiu sekundo, kaj ankaŭ 7½ koloroj (19 cm) en ĉiu sekundo, sed ankaŭ aparatoj haveblas kun aliaj aŭ kun varieblaj rapidecoj. La aparatoj ankaŭ klasiĝas kiel ne-porteblaj, porteblaj, kaj tre porteblaj.



Tre distraj povas esti la miniaturaj, baterifunkciigeblaj porteblaj aparatoj, ne pli grandaj ol manportebla radioaparato. Per tiaj maŝinoj oni povas registri sonojn de la naturo, aŭ eĉ kaŝe la konversaciojn de preterpasantoj, sonfikojn, ktp. Sed ĝenerale la tono ne estas tiel klara, kaj la bendrapideco ne sufiĉe preciza, kompare kun la pli grandaj modeloj.

Por esperantistoj oni povus rekomendi "porteblan" sed elektran, ne baterian, maŝinon kun almenaŭ du rapidecoj (3½ koloroj = 9½ cm, kaj 7½ koloroj = 19 cm) kaj du trakoj. Tiel oni havas aparaton, kiu sonigas 90% de la bendoj, kiujn faras aliaj esperantistoj tra la mondo. Tia aparato povas kosti inter proksimume \$70 kaj \$170.

Magnetofonojn, bendojn (neuzitajn) kaj diversajn akcesorajn ekipaĵojn oni ofte povas aĉeti favore prete pere de la pluraj perpoŝtaj vendejoj, kies speciala fako estas elektroteknikaj aparatoj. Se iu esperantisto deziras informojn pri tiaj aferoj, inkluzive ekzemple prezojn, adresojn de perpoŝtaj vendejoj, ktp, li povas sin turni al S-ano Ver Ploeg, kiu volonte donos la informojn laŭeble.

Ĉu vi uzos magnetofonon, por ke via esperantista vivo fariĝos pli kontentiga? Nepe.

H. K. Ver Ploeg

Ver Ploeg estas fervora esperantisto depost la dua mondmilito. Es-tante soldato en la usona aerarmeo, li postenis kiel teletajpa komunikisto ĉe flughaveno en la brita kamparo. Ĉar li havis iom da libera tempo dum la dejoraj horoj, kaj volis uzi ilin iamaniere profite, li eklernis la germanan lingvon aŭtodidakte. Sed post unu jaro da pena studado, li trovis, ke li apenaŭ povas legi eĉ la plej simplajn tekstojn en tiu lingvo.

Unu tagon vizitis la ejon, kie li dejoris, oficiro, kiu havis eksterordinaran talenton pri lingvoj: li havis uzeblan konon de 27 da ili, kaj regis flue 8 lingvojn — inkluzive Esperanton. Tiu poligloto ekkonversaciis kun Henĉjo, kiu petis lin rigardi la rezultojn de liaj studoj pri la germana. "Je ĉielo," li diris al Ver Ploeg, "vi bezonas multe da gramatika klerigo. Kial vi ne entreprenu lerni Esperanton?"

Tio estis la unua fojo, kiam Henĉjo aŭdis pri nia lingvo, sed la ideo tiel plaĉis al li, ke li senprokraste anoncis sin ĉe la Brita Esperantista Asocio por koresponda kurso. En Britujo, li lernis, oni dividis la landon en regionojn, kaj ĉiu regiono havas nepagatan instruiston perpoŝtan. Lia instruisto estis samideano nomita Tucker, kiu loĝis en Canterbury.

Henĉjo trastudis du sinsekvajn kursojn pri Esperanto antaŭ ol viziti S-ron Tucker, kun kiu li amikiĝis. Li ankaŭ faris viziton al la kunveno de BEA en Londono, kie li ĝojis konstati, ke post tiel mallonga tempo li efektive povas konversacii en la lingvo. Vizitojn li faris ankaŭ al la kunvenoj de diversaj regionaj kaj lokaj kluboj, kiuj — li raportas kun sentebla bedaŭro — estas ĝenerale multe pli grandaj ol la kluboj en Norda Ameriko.

Ver Ploeg konatiĝis kun pluraj esperantistoj en Birmingham, el kiuj unu estis itala militkaptito, kiu lernis Esperanton — se ne flue, almenaŭ sufiĉe por komprenigi sin — aŭtodidakte, sen helpo, nur pere de itallingva "ŝlosilo"! Tio okazis en 1944, post

la invado de Eŭropo fare de la aliancaj armeoj.

Nelonge post la fino de la milito, do en 1945, Henĉjo estis sendita al nova aerarmea haveno apud Casablanca en Maroko, kie li same dejoradis kiel teletajpa komunikisto. Li tuj konatiĝis kun la tieaj geesperantistoj, kun kiuj li devis paroli nur en Esperanto, ĉar neniu parolis la anglan (escepte du homojn, kiuj ĝin parolis iomete). Li vizitadis la klubkunvenojn kaj multe ĝuis la mirindan amikecon kaj kunulecon de siaj novaj geamikoj.

La marokanoj entreprenis koncerniĝi pri li dum la tuta restado, kaj "ne povis fari sufiĉe por mi." Li memoras, ke ili eĉ "disponigis al mi sekrete armitan berberon por akompani min dum marŝadoj tra la urbo, kiu tiam havis plurajn tre dangeŝajn partojn, tiel ke mi povu vidi tiun tre interesan malnovan urbon en sendanĝereco. Kaj tion mi ja faris plurajn fojojn."

Henĉjo revenis hejmen al Usono iom poste — "hejmo" estis tiam Long Beach, California. Li tuj kontaktis la esperantistojn en tiu urbo kaj helpis konstrui aktivan agadon por Esperanto tie. Dum pluraj jaroj oni instruis klasojn en vesperlernejoj, la publika biblioteko ktp. en la urbo, same kiel en multaj aliaj urboj en la kompare fekunda periodo por nia lingvo tuj post la milito. Tamen, li memoras, ke li bedaŭre konstatis, ke la movado en Norda Ameriko tute ne estas tiel vigla kaj forta, kiel en Eŭropo.

Ver Ploeg iĝis neaktiva ĉirkaŭ 1951. En 1955 li denove kontaktis la movadon kaj estis frapita pro la ŝanĝoj okazintaj dume: precipe la pli maturan kaj efikan rolon de UEA kaj de ĝiaj gvidantoj li notis kun plezuro. Translokiĝinte al Spokane, li komencis instrui Esperanton en vesperaj klasoj kaj eĉ dum unu trimestro instruis klason — laŭ invito de la edukaj instancoj tie — ĉe la Stata Universitato ĉe Cheney, Washington. Dume, kolektiĝis malgranda sed aktiva esperantista rondo de ĉirkaŭ 8 homoj en Spokane.

Sed nun la agado plej kara por nia samideano estas la aŭd-vida servo, kiun li prizorgas por nia Ligo.

Novaj bendoj en la aŭd-vida fako (aldone al la listo aperinta pasintjare): D-ro A. Baur: La kvara nacia lingvo de Svislando. La 42a UK en Marseille, 1957. Ivo Rotkvič: Mortotago de Zamenhof. Ivo Lapenna: La grandeco de D-ro Zamenhof (kun teksto). M. Boulton: De inko al ŝinko (legata de V. Eichholz, kun teksto). V. Eichholz: Vintraj kaj kristnaskaj kantoj (kun teksto). Kantoj de la horo de la Esperanto-Kulturdomo (kun teksto). Muzika vespero en la palaco de belaj artoj. La realeco estas tute alia (teatraĵo prezentita de la Esperanta grupo "La Verda Stelo" en Antverpeno). Eizo Itoo: Mondvojaĝo kaj Japanujo. E. J. Weber: La internacia paco kaj nia pensmaniero. Edmund Privat: Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado. D-ro Baur: La persono de Heinrich Pestalozzi. Bartelmus: Klasika arto. La Kaprino de S-ro Segen (de Alphonse Daudet). Herman Wagner: Muzikopromenado tra la mondo. Islanda programo.

DONACOJ AL LA REVUO

de Richard D. Sias, Palto Alto — \$50 kaj al la ĝenerala kaso de ELNA: Donald Harlow (\$2), Marie Wyckoff (\$4), Ernest Schlage (\$4).

DECIDOJ DE LA ESTRARO

(63-VIII) estas malaprobata, sed poste per pli modesta (63-XII) la Estraro unuanime aprobis pli moderan plioftigon de la Revuo, kun po 20 paĝoj.

(63-IX) per dek voĉoj kontraŭ unu la Estraro aprobis ke ĉiu numero de la Revuo enhavu almenaŭ kelkajn paĝojn da anglalingva teksto (maksimume kvar).

63-X) aprobis ke S-roj McClellan kaj Jahger estu komitatestroj de la L.K.K., kaj ke la datoj 4-7 julio, 1963, kaj la Pick-Roosevelt Hotelo servu por nia 11a kongreso en Pittsburgh.

(63-XI) per sep voĉoj kontraŭ kvar malaprobis la eblecon ke prezidanto

aŭ vicprezidanto fariĝu kandidato por iĝi estro de la Estrara Komitato.

(63-XII) aprobis, unuanime, disponigi bazan sumon de \$1000 el la ELNA-kaso kaj \$500 el la Garantia Sumo al la Revuo, por pliofta aperigo de la Revuo, laŭ la bontrovo de S-roj Broadribb kaj Richardson, kun estonta plialtigo de la baza sumo proporcia al la kresko de la membraro. Ĉiuj sumoj specife donacataj al la Revuo ankaŭ destiniĝu por plibonigo aŭ plioftigo.

SE LA REVUO MISTRASFAS VIN

If you are a subscriber, or member, and have not been receiving the Review regularly; or if the Review has not been addressed correctly, would you please notify the circulation manager, Francis E. Helmuth, 5615 Beaumont Ave., La Jolla (San Diego), California? If you are uncertain when your subscription ends, you will find the date printed on the address slip on the back cover of the Review.

Se vi estas abonanto, aŭ membro, sed ne regule ricevadas la Revuon; aŭ se la Revuo estas misadresita, bonvolu atentigi pri tio la adresiston, Francis E. Helmuth, 5615 Beaumont Ave., La Jolla (San Diego), California. Se vi ne estas certa pri kiam via abono finiĝos, vi povas trovi tiun daton presita sur la adreslipilo sur la malantaŭo de la kovrilo de la Revuo.

Sendu ĉiun informon pri loka, regiona, aŭ alia esperanta agado rekte al la Revuo, por helpi plifaciligi la sekretariajn taskojn. La adreso estas Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio, adreso ĉiam trovebla sur la dua paĝo de la kovrilo de la Revuo. Ankaŭ nia prezidanto, David Richardson, peras por la Revuo tiajn informojn, kaj li estas kontaktebla tiucele.

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al TEJO

KIAL NI EKZISTAS

Ek de la lasta somero, niaj gejunuloj, organizitaj en JEN, krias al ELNA, "Atentu! Ni ekzistas!" Surprize kaj konsternite, ni aŭdas de kelkaj ELNA-anoj la jenan eĥon al niaj krioj: "Kial?"

Huj! Pardonu nin, sammovadanoj. Ni simple supozis ke vi komprenas. Do nun ni difinitive klarigu nian ekzistokialon. La junularo Esperantista havas la samajn karakterizojn kiel la junularo tutmonda: ni volas ĝui la junajn jarojn; ni volas impulse ekagi, ne diskutadi; fari, ne revii; ni naskas ideojn senĉese, ĉiam opinias ilin pli bonaj ol la ideoj de niaj pliaĝuloj, kaj volas tuj esprimi kaj efektivi ilin.

Tiuj karakterizoj estas intimaj, ne-forigeblaj partoj de la juneco, kaj ili estas evidentaj ĉe la ĝisnunaj agadoj de JEN. Ĉe niaj festoj (okazis jam 4), niaj babilado kaj verva vesperivo estas tiaj kiajn tre malmulte da pliaĝuloj aŭ partoprenus aŭ aprobis.

En nia JEN-Bulteno (kiun eĉ maljunuloj rajtas aboni), ni montras ke Esperanto estas uzebla por ĉiaj celoj, ne nur por paroli pri Esperanto mem: ni publikigas tie niajn diversajn sciojn kaj opiniojn pri religio, politiko, socio, ktp., temoj malofte troveblaj en la ĝenerala gazetaro Esperanta. Fakte, komparante la lastajn 3 numerojn de la Revuo kaj la JEN-Bulteno, oni trovas ke 12% de la spaco en la Revuo estas okupita per aferoj ne pri Esperanto, kompare kun 34% en la JEN-Bulteno.

Ankaŭ sur aliaj terenoj la junularo montras sin valora al la ĝenerala movado. La junularo vidis la mankon de tutnacia korespondkurso; do la Esperanto-Klubo de Harvard verkis kurson, reklamas ĝin en naciaj gazetoj, kaj nun havas lernantojn tra Usono. La junularo rimarkis la mankon de konvena materialaro por hejma lernado; do JEN zorgis kunmeti la "Teach Yourself" Esperanto Kit, vendotan tutlande. La junularo sentis kelkajn mankojn ĉe la provizado de

libroj al la nordamerika Esperantistaro; la rezulto: la "Libroservo de JEN", oportune lokita en la urbo Novjorko. En la venontaj monatoj, precipe ĉe la ELNA-Kongreso en Pitsburgo, vi vidos pli da kontribuoj fare de la junularo al la tuta movado.

Sed vi vidos ankaŭ pli da apogo fare de ELNA al JEN. Ĉar samtempe dum la junularo komencas bone kompreni la sintenon de la pliaĝularo, ankaŭ ili ekkomprenas nin, kiel montras la ekzisto de ĉi tiu pago, la kongresrabato donita al JEN-anoj, kaj aliaj favoraj agoj de ELNA. Finfine ni antaŭvidas rapide kreskantan kunlaboradon kaj reciprokan servadon inter niaj du organizoj. Niaj du anaroj restos ĉiam homnature diversaj, sed per tiu diverseco ni kompletigos unu la alian, cele al pli sprita, pli forta, kaj pli efika movado.

FREŜAJ NOVAĴOJ EL JEN!

"Teach Yourself" Esperanto Kit estas preta. JEN ĵus eldonis novan kolekton de lerniloj por anglalingvanoj. El la tuta mondo JEN elektis la plej bonajn materialojn: lernolibron (Teach Yourself Esperanto) el Anglujo, konversacian diskon el Francujo, informlibreton pri la lingvo el Kanado, kaj belajn ekzemplojn de uzata Esperanto el tri aliaj landoj. La prezo de la kompleto estas **favorega**: nur \$4, t.e. 70c **malpli** ol la suma kosto de la apartaj enhavaĵoj. Se vi volas havi aŭ **donaci** ĉi tiun posedindan kompletan, simple sendu \$4 al JEN, 30 Avenue B, New York 9, New York.

Bulteno. La JEN - Bulteno ŝanĝis sian aspekton. Ĝi havas nun pli taŭgan formaton, kaj estas eĉ pli aboninda. Sendu nur \$1 por 1 jaro al S. Cohen, Kasisto; 16 Long Avenue, Allston 34, Massachusetts.

Verkis Jonathan Pool.

Redaktis Humphrey Tonkin.

Children's Esperanto Literature

Most language study is undertaken in school, and while Esperanto seems to present an exception to this fact (the majority of students study in courses sponsored by local Esperanto societies), a growing number of elementary school children in our own country as in others are learning to talk and play in Esperanto. Added to these is a small but growing group of children for whom Esperanto is the native language, the result of marriages between Esperantists. If the present plans for an international convention to require Esperanto in the school systems of a block of countries simultaneously are realized, as seems probable, thousands more will be filling school halls with the sounds of the international language. This, one of the most exciting and significant developments in the language history of the world, presents a major challenge to the Esperanto movement to provide teachers, instruction, and materials.

In the past few years a small flurry of books and booklets for the young have been appearing on the market. Where it was once difficult to find so much as a single picture book, dozens of first grade readers, adventure stories, and the like are now on the market, many of them published by our own Esperanto Press of Oakville, Ontario. The rapid demand for books, and the inability of most Esperanto publishers to keep their books in print, unfortunately limits the number of items available at any one time. One must be on the alert to catch many of the more attractive publications when they are available, such as the lovely **Martin Krpan**, a Yugoslavian fable that appeared only a few years ago with large full page water colors, and all too soon entered the "out of print" lists.

The current U.E.A. book service catalog lists 44 books in its children's division, a number which could no doubt be expanded by 20 or 30 more by reference to other book sellers. Among those still out are the **Japanaj Fabeloj**, one of the most beautiful fairy tale books yet published, and its new companion volume **Ĉeĥoslovakaj Fabeloj**, equally appealing with its familiar yet different pictures illustrating fables that are also strangely familiar, yet strangely different.

Children's stories are, in any language, strongly international. Much more than books for adults they make the leap across national lines without difficulty. Yet probably only in Esperanto can such a cosmopolitan literature be found, even with children's literature.

La Marvirineto, Hans Christian Andersen's charming tale, is now available in a children's edition, newly translated from the Danish and beautifully illustrated. With this must go the new final volume

of the collected tales of H. C. Andersen, published only this spring by Heroldo, soon to be accompanied by a new edition of the earlier volumes. Antoine de Saint-Exupéry's **La Eta Princo**, reviewed below, belongs in every child's library. Written for adults, and printed in an adult-type book ("without pictures or conversations" as Alice would say), but nonetheless a children's classic, Jonathan Swift's **Liliputo** must be mentioned. (However, notice, if you are the kind of parent who objects to certain things in children's stories, that this edition is unexpurgated.) But what about **La Miraklaj Aventuroj de S-ro Longkrurulo**? Or the **Bildlibro Pri Bestoj**? We cannot mention everything here.

